## *La hodiaŭa paroka kirko*

Foslabori je la roka krutaĵo venadis ĉiutage multaj homoj, kune kun dungitaj laboristoj da ili estadis 50 ĝis 60. La 25-an de aprilo 1750[7] la laboro tiel antaŭeniĝis, ke la spaco sufiĉis por fundamentoj. La unua ŝtono estis kuŝigita tien la 5-an de majo kaj unu tagon poste komencis masonistoj labori. La fundamentan ŝtonon de la kirko oni grandglore metis la 19-an de oktobro 1750, tiuloken, kie pli frue troviĝis la bildo de Virgulino Mario. Por la solenago oni produktigis oritajn trulon kaj martelon. La unuan baton faris sinjoro dekano, poste sekvis cetera klerikaro, la urbestraro kaj pluaj nobelaj urbanoj. Fine ankaŭ plebanoj rajtis frapi sur la ŝtonon laŭdezire, ĉiu unufoje. La ŝtono, sur kiu videblas ĝis hodiaŭ la jarindiko *„1750“*, rimarkeblas sub la predikejo. Jare 1760 laŭ la paroka kroniko finiĝis la propra konstruado kaj komenciĝis pentrado.

Merkrede, la 22-an de oktobro 1760, la kirkon konsekris Johano grafo de Schärffenberg, helpepiskopo de Olomouc.[8]

La hodiaŭa kirko estas konstruita surloke de la estinta de Sanktaj Filipo kaj Jakobo, ĉe la aŭgustenana monaĥejo, kiun 1784 malfondis la imperiestro Jozefo la 2-a. Aŭtoro de la projekto estis Nikolaus Thalherr, arĥitekturisto ekloĝinta en Fulnek, al kiu oni atribuas ankaŭ la kirkojn en Budišov nad Budišovkou kaj en Šternberk.[9]

---

7 DPF, pĝ. 7. La paroka kroniko datigas je la 25-a de aprilo 1750 kuŝigon de fundamenta ŝtono de la altarejo.

8 Paroka kroniko, FKZ-2, pĝ. 3, kaj DPF, pĝ. 7–10. DPF mencias konsekro-daton je la 19-a de aprilo 1762, sed markas ĝin necerta; tamen pri la jaro laŭskribe ne estas duboj. La konsekranto laŭ tiu ĉi verko estis Maksimiliano grafo de Hammilton, episkopo de Olomouc. Malgraŭ tio KF sur la paĝo 38 datas la konstruadon je la jarintervalo 1750–1752 kaj la konsekradon je 1760. FKZ-2, pĝ. 3, mencias, ke memor-dokumento el la jaro 1760, enigita en la kupoltureton, datas meton de la fundamenta ŝtono je la 19-a de oktobro 1750, finon de kruda masonado je la jaro 1752, surmeton de turglobo je la 29-a de septembro 1760, kaj fine konsekradon de la kirko je la 22-a de oktobro 1760.

9 MM, pĝ. 857–858.

